# *Italio kaj Kubo plifortigas siajn rilatojn*



La prezidanto de la ministra konsilantaro de Italio, Matteo Renzi, ekigas sian laboragendon en Kubo, kie li plenumas oficialan viziton kaj ?eestas entrepreneman forumon en la Hotelo *Nacional.*

Li anka? vizitos la superan instituton de artoj, kie prelegos anta? la studentaro, sekve vizitos la monumenton al la nacia heroo de Kubo, José Martí situanta en la Placo de la Revolucio kaj estos akceptita en oficiala ceremonio.

Tiu ?i estas lia unua vizito en Latinameriko kaj Karibio, ekde kiam li enposteni?is en februaro de 2014.

La diplomatiaj rilatoj inter amba? landoj ekzistas ekde 1903, kaj post la milita periodo, ili rekomenci?is en 1945.

La rilatoj inter la du landoj estas stabilaj kaj amikaj kun perspektivoj pli ampleksi?i; ekzistas bona kunlaboro sciencteknika, kultura, investoj- speciale en turismo kaj energio.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/74067-italio-kaj-kubo-plifortigas-siajn-rilatojn

# Radio Habana Cuba